## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede …

**la 20-an de decembro**
**ĉe François Randin**
ch. de Vallombreuse 14, Lausanne
tél. 076 411 14 55

# *2014*

la 17-an de januaro
la 14-an de februaro
la 14-an k. la 28-an de marto

Ne forgesu aliĝi ĉe
http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6

## Novaĵo

Ekde la 24-a de decembro, nia vicprezidantino Charlotte restados en Ĉinio dum 2 monatoj por perfekti sian esperantan lingvon kaj por viziti la landon. Ni deziras al ŝi tre belan vojaĝon kaj ŝi renkontu ĉarmajn amikojn kaj amikinojn.

## Monata citaĵo

*Ne lasu la mondon ŝanĝi vian rideton, sed lasu vian rideton ŝanĝi la mondon.*

Nekonata aŭtoro.




**Laŭzana Esperanto – Societo**
Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28
esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14 55 - Kasisto.: Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


**Laŭzana Esperanto-Societo**

# Informilo

Januaro 2014 – n° 1

## *KIEL TRADUKI ...?*

**Lunde, la 6-an de januaro**

je la 20-a, ĉe la unua etaĝo
de la laŭzana stacidoma bufedo,
**ni malkovros "ĝin" pere de kelkaj esprimoj de la franca al esperanto.**




*Jaro de la ĉevalo*

**Lunde la 3-an de februaro**
*Ĝenerala Asembleo*

**Lunde la 3-an de marto**
*Karlota parolos pri sia vojaĝo en Ĉino.*

**Lunde la 7-an de aprilo**
*Decidota*

**Lunde la 5-an de majo**
*Decidota*

# Festo en la honoro de Lucienne Dovat

Je la 25-a de novembro nia ĉarma membrino Lucienne ricevis diplomon de U.E.A. por gratuli ŝin pro membreco en tiu societo dum 50 jaroj.



Ŝi ricevis tiun diplomon el la manoj de Mireille Grosjean, kunprezidanto de S.E.S., kiu ricevis ĝin, kiam ŝi estis en la UEA-Kongreso en Rekjaviko tiun jaron. Lucienne ricevis ankoraŭ belan bukedon el la direktoro de la institucio, kie ŝi loĝas nun.

La svisa ĥoro direktita de S-ino Elisabeth de Mestral kantis multe da gajaj kantoj el la 18a jarcento kaj el svisa folkloro. Ĝi estis multfoje aplaŭdita de la loĝantoj de la institucio kaj de la vizitantoj.

Multe da membroj de la L.E.S. ĉeestis en tiu festo kaj donacis al Lucienne belan rozkoloran azaleon kaj nia vicprezidantino legis ĉarmajn vortojn por gratuli Lucienne kaj deziri al ŝi bonan sanon kaj feliĉon.



# Kristnaskdato laŭ historio



Fakte oni ne scias, kiam vere naskiĝis Jesuo Kristo. Nur en la jaro 354 la Eklezio decidis soleni la naskon de Kristo je la dato de la ĝistiama pagana festo en Romio la 25-an de decembro. Tiu estis antaŭe romia festo de "*sol invinctus*" (nevenkita suno), ĉar en tiu tago post la vintra Solstico la tagoj ree ekplilongiĝas kaj de praaj tempoj la paganaj ritoj festas tiun naturan aferon ligitan kun la reveno de espero, lumo, varmo, promeso de onta rikolto. En Romo la Saturnaj tagoj (*saturnalia*) disvolviĝis de la 17-a de decembro ĝis la Kalendoj de januaro, t. e. la dek lastajn tagojn de la jaro. Ili estis origine festitaj honore al Saturno, romia dio de agrikulturo. Dum tiuj festotagoj okazis misordaj ĝuadoj, kiuj malplaĉis al la Ekleziuloj, kiuj provis regi la socion. Ankaŭ kun la naskiĝtago de Mitrao, dio el Irano, ligiĝis tiu festo de "sol invinctus", kaj li estis dio de lumo, kaj simbolis lukton kontraŭ la mallumaj kaj malbonaj fortoj. Tiu kulto enradikiĝis en la Romia imperio (komparu kun la irana festo Jalda de la 21-a de decembro).

http://eo.wikipedia.org/wiki/Kristnasko